## Nia adreso

DJH Jugendherberge Wittenberg
Schlossstraße 14/15
06886 Lutherstadt Wittenberg
Tel: +49 3491 505205 (germanlingve)
https://www.jugendherberge.de/jugendherbergen/wittenberg-703/portraet/
wittenberg@jugendherberge.de

## Niaj PSI telefonnumeroj

0800 336 36 36 62 (senkoste el Germanio, kun germanlingva anonco) aŭ
+49 (0)1520 / 17 18 060 al la PSI-estro Ralf Haumer.

## Kiel atingi la domon?




Kiam vi alvenos dum la unua tago vi trovos nin (la PSI-teamon) en la **enirhalo**. Dum la aliaj tagoj ni havos ĉambron **107** kiel oficejo.

## La vetero:

https://kachelmannwetter.com/de/vorhersage/7303020-lutherstadt-wittenberg/kompakt

## Vespermanĝo okaze de malfrua alveno:

Se vi alvenos post 19:00h, anoncu tion al ni por ke ni stoku manĝaĵon en fridujo.

## Malaliĝo:

Se vi pro iu ajn kaŭzo ne povos partopreni nian PSI-on, bonvolu sciigi tion tuj al ni kiel eble plej frue per retletero al »psi@esperanto.de«.

**Kunportendaĵoj:**

Mantukoj:

Mantukoj haveblas de la domo por 1 € por peco kaj ŝanĝo.

Littolaĵoj:

Ne kunportu - tio jam inkluziviĝas en la prezo.

**Ni aldone rekomendas kunporti laŭ via emo:**

Specialaj programeroj:

okazos **dancbalo je la temo „mezepoko"**! (tio tre gravas por eventuale mem fari aŭ aĉeti kostumojn)

okazos **ĵonglokurso** kun Klaus; kunprenu ĵonglopilkojn, klabojn ktp. okazos **sportaj programeroj kiel Zumba, malstreĉiga gimnastiko kaj akrobataĵoj** - do kunprenu sportajn kaj komfortajn vestaĵojn por ili

okazos klasika ŝtofkolorigado per farboj kaj penikoj; presado sur t-ĉemizoj kaj saketoj => kunportado de t-ĉemizoj necesas por partopreni, saketoj aĉeteblas

Kunportendaĵoj por programeroj:

muzikiloj, kantaroj kaj notfolioj

tondiloj, krajonoj kaj aliaj iloj por manlaboro

skribiloj kaj kajeroj

por kant-/preĝemuloj: la libro »Adoru«

Kolekto de kantoj por infanoj kaj plenkreskuloj:

Kunportu tekstojn, notojn, kantolibrojn de infan- kaj aliaj kantoj por kantigi la infanojn kaj interesitajn plenkreskulojn.

Vestaĵoj:

naĝkostumoj kaj granda bantuko

taŭgaj vestaĵoj kaj fortikaj ŝuoj por migradoj kaj ekskursoj

sportaj vestaĵoj kaj ŝuoj i. a. por Zumba

kostumoj por »mezepoka balo«

Ludiloj:

pilkoj kaj aliaj sportiloj, unucikloj, bicikloj

puzloj kaj aliaj ludoj

Aldone:

bildoj kaj filmoj

ne forgesu kunporti bonan humoron!

Atendas vin:
koncerto de Feri Floro
teatraĵo de Christoph Frank

**Libroservo:**

La Flandra Esperanto-Ligo ofertas sian libroservon. Se vi deziras jam mendi libro(j)n, ankaŭ por unue rigardi ilin, elektu ĉi-tie: https://www.esperanto.be/fel/but/
kaj anoncu vin ĉe Gerd Jacques retpoŝte per gerd@esperanto.be .

Ĝis baldaŭ! Amike - **La PSI-Teamo** psi@esperanto.de https://psi.esperanto.de/teamo